

KVARA ADVENTA DIMANĈO – 22-an de decembro 2013

JESUO NASKIĜOS DE MARIA, EDZINO DE JOZEFO, FILO DE DAVID – Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 1, 18-24

Jen kiel naskiĝis Jesuo Kristo: Lia patrino Maria estis fianĉinigita al Jozefo; antaŭ ol ili kunvenis, ŝi troviĝis graveda per la Sankta Spirito. Jozefo, ŝia edzo, estante justulo ne volis kompromiti ŝin. Tial li intencis sekrete ĉesigi la gefianĉecon.

Sed kiam li pripensis tion, jen anĝelo de la Sinjoro aperis al li en sonĝo, kaj diris al li: "Jozefo, filo de David, ne timu edziĝi al via fianĉino Maria: ĉar la infano, kiun ŝi atendas, estas per la Sankta Spirito. Maria naskos filon, kaj vi nomos lin Jesuo: ĉar Li savos sian popolon de ĝiaj pekoj". Kaj tiel plenumiĝis tio, kion la Sinjoro diris per la profeto Jesaja: "Jen virgulino koncipos kaj naskos filon, kaj oni donos al li la nomon Emanuelo, kio signifas: Dio estas kun ni".

Kiam Jozefo vekigis, li faris kiel ordonis al li la anĝelo de la Sinjoro kaj akceptis sian edzinon.

Mateo priskribas la naskiĝon de Jesuo ĉerpante inspiron en la unua libro de Biblio, Genezo, ĉar li volas indiki ke, en Jesuo, estas nova kreado. La libro Genezo komenciĝas per tiuj ĉi vortoj: "En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron", kaj poste skribas la aŭtoro, "la spirito de Dio ŝvebis super la akvo". Same nun la krea spirito intervenas por la nova kreado.

Jesuo estas la vera homo kreita de Dio, la homo kiu havas dian vivon, kapabla superi la morton. Ni vidu kion diras Mateo: "Jen kiel naskiĝis Jesuo Kristo". Post kiam dum 39 fojoj la verbo naskigi estas atribuita al iu viro kiu generas alian homon, alveninte al "Jakobo generis Jozefon", tie la generadĉeno interrompiĝas.

La evangeliisto ne skribas "Jozefo generis Jesuon", sed de Maria estas naskita. Do tiu tuta tradicio – la patro ne transdonadis nur la vivon, sed la tradicion kaj la spirualecon – en la popolo de Izraelo interrompiĝas ĉe Jozefo. "Tiel naskiĝis Jesuo Kristo: Lia patrino Maria estis...", ĉi tie oni tradukas per 'fianĉino', malfacilas en nia lingvo utiligi iun vorton kiu ne ekzistas por indiki la riton de geedziĝo kaj nupto en Izraelo.

La geedziĝo okazas en du etapoj. La unua, kiam la knabino estas dedkdujara kaj la knabo dekoka, okazas la geedziĝo. Ekde tiu momento ili estas geedzoj, en sekva momento, post unu jaro, okazas la nupto kaj la knabino eniras la edzan hejmon. En la jara intervalo ne licas havi geedzajn rilatojn kaj, en kazo de adulto, estas antaŭvidita la ŝtonmortigo.

Maria do jam estas edziniĝinta. Ĝi estas la unua fazo de la geedziĝo. *"Antaŭ ol ili kunvenis"*, do antaŭ ol ili transiru al nupto, *"ŝi troviĝas graveda per la Sankta Spirito"*. La evangelio estas nek ginekologia nek biologia libro sed estas teologia. La evangeliisto celas indiki ke en Jesuo estas la nova kreado. Samkiel la Spirito ŝvebis super la akvo, tiel la krea Spirito ŝvebas super Maria kaj Jesuo naskiĝas kiel ekzemplo kaj modelo de la kreado volata de Dio.

Do per tiu Sankta Spirito oni celas la kreaĵon de Dio. *"Jozefo, ŝia edzo, estante justulo"*, justulo ne havas nian implicitan nuancon de persono morale integra, justulo estas persono fidela, observanta la leĝojn kaj ĉiujn preskribojn de Moseo. Nu, la fakto esti justulo, devigis Jozefon denunci la edzinon kiel adultulinon, kaj ŝin ŝtonmortigi.

"Ne volis kompromiti ŝin", do Jozefo kriziĝas inter la respekto de la leĝo kaj iu sento, se ne de amo, de mizerikordo. *"Tial li intencis sekrete ĉesigi la gefianĉecon"*. La repudio estis tre simpla tiame, oni povis repudii la edzinon eĉ pro bruligita manĝo, sufiĉis skribi sur paperpecon *"vi ne plu estas mia edzino"*, kaj la virino estis forpelita. Jozefo do ne volas ŝin denunci, ne volas mortigi sian edzinon, sed tamen ne povas ŝin teni ĉe si.

Tial li pensas ŝin repudii sekrete. Sed sufiĉas ke la leĝofronto estu leĝere fendita per la amo kaj la Spirito eniras kaj intervenas. Fakte, *"Sed kiam li pripensis tion, jen anĝelo de la Sinjoro aperis al li en sonĝo..."*. Kial en sonĝo? En la hebrea mondo – kaj Mateo verkas por juda komunumo – oni evitas la rektan kontakton inter Dio kaj la homoj, Dio do intervenas en sonĝo.

En la Libro de Nombroj legeblas: *"Se estos iu via profeto, mi Jahveo vizie al li riveligos, sonĝe mi alparolos lin"*. La sonĝo estas la maniero kiun Dio havas por komuniki kun la homoj. *"Jen anĝelo de la Sinjoro aperis al li en sonĝo"*. Per Anĝelo de Dio oni ne celas anĝelon senditan de la Sinjoro, sed kiam Dio intervenas kun la homoj, li estas bildigata per tiu anĝelo de la Sinjoro, kiu estas Dio mem.

Estis iu distanco inter Dio kaj la homoj, estis iu foreco, kaj en la hebrea mondo oni ne permesis ke Dio alproksimiĝu al la homoj. Kiam li tion faradis oni uzadis tiun ĉi formulon *"anĝelo de la Sinjoro"*, sed temas pri Dio mem. La anĝelo de la Sinjoro intervenas tri fojojn en tiu ĉi evangelio ĉiam rilate la vivon, ĉar Dio estas la Dio amanta la vivon. Ĝi intervenas ĉi tie por anonci la vivon de Jesuo al Jozefo; pliposte ĝi intervenos por ĝin defendi de la murdigaj komplotoj de reĝo Herodo kaj fine en la momento de la resurekto, por konfirmi ke la vivo, kiam ĝi venas de Dio, kapablas superi la morton. Kaj ĉi tiu estas la unua fojo.

"Kaj diris al li: "Jozefo, filo de David, ne timu edziĝi al via fianĉino Maria" jen fakte ili ne estas geedzoj. "ĉar la infano, kiun ŝi atendas, estas per la Sankta Spirito" do estas tiu nova kreaĵo kiu manifestiĝas en Jesuo. "Maria naskos" laŭvorte akuŝos "filon, kaj vi nomos lin..." kaj jen ĉi tie estas novaĵo.

Infano oni kutime nomis kiel la patro aŭ la avo, tiel ke la nomo eterne pludaŭru, maniero por resti porĉiame vivanta. La tradicio do postulis ke la infano havu la nomon de la patro aŭ de la avo. Nu, kun Jesuo interrompiĝas la tradicio, kun Jesuo komenciĝas nova epoko: *"kaj vi nomos lin Jesuo: ĉar Li savos sian popolon de ĝiaj pekoj."*

Ni vidas neniun interligitecon inter la fakto ke li nomiĝas Jesuo kaj la fakto ke li savos sian popolon de ĝiaj pekoj. En esperanto, por redoni la ideon de tio kion la evangeliisto volas transdoni al ni, ni devus traduki "Li nomiĝos Savanto, ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj". Fakte en la hebrea Jesuon oni diras Jeshua, kaj la verbon 'savos' oni diras joshua. Do estas vokala malsimileco.

Li nomiĝos Jeshua ĉar joshua, do ni povus diri li nomiĝos Savanto, ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj. Sed tio al kio la evangeliisto volas alveni, estas la citaĵo de ĉapitro 7 versiklo 14 de profeto Jesaja " *Jen la virgulino gravediĝos kaj naskos filon*" la profeto estas parolanta kun reĝo Akaz pri la naskiĝo de la filo Ezeĥia, " *Al li oni donos la nomon Emanuelo kiu signifas 'Dio kun ni'*".

Jen tiu estas la kerna kialo, la gvida fadeno de la tuta evangelio de Mateo. Tiu formulo "Dio kun ni", kiu reaperos pli malpli meze de la evangelio, kiam Jesuo diros al siaj disĉiploj " *Ĝis kiam mi devos resti kun vi*" aŭ kiam li diros " *Kiam du aŭ pli kuniĝas en mia nomo mi estas meze de ili*", kaj krome ĝi estos la lasta vorto de Jesuo.

La lastaj vortoj de Jesuo "Mi estas kun vi porĉiame" tiu estas la gvida fadeno de la evangelio de Mateo, la Dio kun ni, iu Dio do kiun oni ne plu devas serĉi, sed akcepti, kaj kun li kaj kiel li iradi rekonte al la homoj. Se Dio iĝis homo, la homo ne plu devas iri renkonte al Dio, sed lin akcepti. Komenciĝas la epoko en kiu oni ne plu vivas por Dio, sed vivas el Dio kaj kun Dio oni iras renkonte al la homaro.

Kaj finas la evangelio, " *Kiam Jozefo vekigis, li faris kiel ordonis al li la anĝelo de la Sinjoro kaj akceptis sian edzinon*". Temas do pri evangelio entenanta grandajn novaĵojn. Kun Jesuo Dio iĝis homo, tio signifas ke Dio iĝis komplete homa kaj do, ju pli la homoj estos homaj, des pli ili malkovros kaj manifestos la diecon kiu estas en ili.